CNT AIT FAI
INTERNACIA LABORIST-ASOCIO
INFORMA BULTENO
NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO
ADRESO: ESPERANTO-FAKO AV. DURRUTI 30
BARCELONO — HISPANIO
IBERIA ANARKISTA FEDERACIO
II-a jaro 10 JANUARO 1938 Numero 13

# KIO DECIDIĜOS DUM 1938 JARO?

La ekpuŝo de la proletareago kontraŭ la faŝista ribelo de 19 de julio 1936 provokis revolucion. Sed la faŝismo ne restis venkita. Pli ol 18 monatojn daŭras la luktado. Ĉe la flanko de la hispanaj faŝistoj metiĝis la internacia faŝismo, rezultigante el tio militon por sendependo kontraŭ la invanditojn.

Se ni estus venkintaj en la ses monatoj, multo estus variinta. La longa daŭro de la milito modifis la fizonomion de la antifaŝista Hispanio. La partiaj lozungoj cedis sian lokon al la novaj luzungoj de kolektiva luktado de ĉiuj antifaŝistoj. Anstataŭ diversaj flagoj k partikoloroj reliefiĝis unuecaj koloroj k flagoj, unuecaj luzungoj. Necesis trovi neŭtralan platformon antifaŝistan. Tiu platformo estis la Respubliko, kontraŭ kiun direktiĝis la reakcia "putĉo", de la faŝistoj. El tio rezultis pro imperativa neceso nova koncepto pri revolucia patrio, kiun rekonis ĉiuj partioj k ĉiuj organizoj. Ankaŭ la anarkistoj. Neniu povis esti escepto.

Unu situacio paradoksa. La malnovaj malamikoj al la patrio fariĝis ĝiaj defendantoj. Militformacioj, konsistigataj el la membroj de JJ. LL., akceptis la flagojn de la Respubliko k havis orgojlon, ke povas distingiĝi speciale en la luktado kontraŭ la komuna malamiko sub tiuj flagoj. Anarkistaj ĉefoj ĉeestis militistajn defilojn k anstataŭ "La Filo de la Popolo" aŭskultis la himnon de la Respubliko. La respublikanaj simboloj estis rekonitaj de ĉiuj.

Sed estas simboloj. Dum ne transiras de simboloj, la hieraŭaj antipatriotoj timas nenion. Ni konsentis kompromisojn. Ni akceptis la militarigon k kun tio prokrastigis, metis je dua vico nian lukton kontraŭ la militdisciplinon. Ni rekonis la aŭtoritaton de la Ŝtato, ĉesigante provizore nian malnovan luktadon kontraŭ ĉiu ŝtata institucio. Ni partoprenis en la registaro k kunlaboris kun ĝi en la klopodoj gajni la militon kontraŭfaŝisman.

La konsekvencoj estis gravaj. En la tragiaj okazajoj de Majo, spontanea reago de la laboristoj kontraŭ la kreskanta aŭtoritato de la ŝtato, ni metis nian prestiĝon k nian influon en la amasoj por atingi, ke ĉesiĝu la mortiga batalo inter fratoj.

Tiuj estas la pruvoj pri nia bonvolo por la kunlaborado kun ĉiuj ceteraj sektoroj antifaŝistaj; tio demonstras kiom da oferoj fari ni pretas. Ni pretas oferi ĉion krom la triumfon kontraŭ la faŝismo! Ni oferas nian rajton por kunlabori en la direktado de la milito post nia eliro el la registaro. Sed ni estis k estas la soldatoj de la revolucio. Oni ne interpretu la koncesiojn en niaj idealoj kiel signo de malforteco. Ne temas pri la konkero de la politika povo nek gajni poziciojn kun egoistaj pririgardoj. Tio kio nin interesas estas la socia k politika enhavo de la respubliko.

Nia batalantoj volas scii por kio ili devas batali. Ni deklinis la totalan ŝtaton. Estas pro nia influo, ke nia revolucio havas karakteron pli libera ol ĉiuj precedencaj en aliaj landoj. Ni defendas la absolutan egalecon de la rajtoj de ĉiuj partioj k antifaŝistaj organizoj. Sed ni kontraŭas kun egala energio kontraŭ la tendenco al la superrego, kiu estas notebla. Ni ne forlasis niajn finpostulatojn, kvankam hodiaŭ ni ne parolas pri ili. Ni rekonas la respublikon kiel politikan esprimon por nia popolo. Sed ni ne volas retroiri al tiu respubliko burĝa k kaduka, kiu ekzistis de 1931 ĝis 1936a. Ni defendas la konkeraĵojn, kiujn la popolanaro per si mem atingis post 19a de julio 1936a. La oficiala eklezio devas esti nuligita, ne povas restariĝi ĝia povo antaŭa. La nobelaro devas esti abolita radike k efektive. Oni ne povos reeajtigi la grandterposedintojn. Al neniu oni devas permesi detrui la proletajn kolektivojn. La kooperativoj estas, respektendaj. La procezo de sociigo devas antaŭeniri k samtempe la naciigo de la publikaj servoj kie konvenas. La politika strukturo de Hispanio devas esti federalisma.

Ĉi tiuj estas niaj postulatoj. Sed samtempe ili estas la karakteristiko de la hispaniaj revolucio, kiu komenciĝis antaŭe 1931a k unu el kies decigigaj fazoj estas finiĝanta aktuale. La defendo de ĉi tiuj ekonomiaj k sociaj enkondukoj donas sian apartan noton al nia lukto kontraŭ la monda faŝismo. Pro tio nia luktado estas internacieca; pro tio la proletaro el ĉiuj landoj devas esti ĉe nia flanko.

Ni estas ĉe la komenciĝo de nova epoko de la Historio. Se gajnos la faŝismo en Hispanio, venkos la totala ŝtato, la nacia aŭtokrata ekonomio k la sklavigo de la proletaro. Se gajnos ni, triumfos nova principo de libero k tolero en la politiko kiel en la ekonomio.

K ni triumfos!

Nia luktado estas grandioza, nia Revolucio atingas al la profundecoj. Ĝies fajreroj difuziĝas tra la terglobo. Nia venko determinos la morton de la internacia faŝismo.

K ĉi tio estas kio decidiĝos dum 1938a jaro.

A. SOUCHY

# La Kongreso de A. I. T. en Parizo



K-do. M. Vazquez, ghenerala sekretario de C. N. T. kiu partoprenis la Kongreson de A. I. T. en Parizo.



K-do David Antona, de la Kamparana Federacio el Madrido, kiu partoprenis la Kongreson de A. I. T. en Parizo.

De la 8a ĝis la 17a de decembro inkluzive okazis en Parizo la eksterordinara Kongreso de A. I. T. celebrita laŭ propono de C. N. T.

La precipa objekto de tiu ĉi internacia kunveno estis ekzameni la situacion de Hispanio k adopti rezoluciojn, kiuj decidus rektan intervenon de la internacia proletaro en solidaro k defendo por la afero de la hispania proletaro.

Estis reprezentataj en ĉi tiu kongreso la sekvantaj organizoj: C. N. T. de Hispanio, S.A.C. de Svedio, C.G.T. de Portugalio, C.G.T.S.R. de Francio, N.S.V. de Holando, N.S. de Italio, C.G.T. de Ĉilio, F.A.U.D. de Germanio, la anarkosindikalista grupo de Belgio, la Anarkista Federacio de Polio k la Anarkosindikalistaj Grupoj de la sama k F.O.R.A. de Argentinio.

Prezentis sian aliĝon al la Kongreso la Nordamerika sekcio de A.I.T. k transsendis perletere konkordon, bedaŭrante pri sia neĉeesto, k F.O.R.U. de Urugvajo.

Estis ekzamenataj k diskutataj grandinterese la informoj de la tri sekretariaroj de A. I. T.

Oni analizis varme la ampleksegan informon prezentitan de C.N.T., en kiu oni priatentas pri la sekvanta linio ekde deknaŭa de julio 1936a ĝis hodiaŭ de C.N.T. k la marŝo de la okazaĵoj politikaj, ekonomiaj k militaj, atingante al la konkludo demonstri, ke la manko de solidaro flanke de la internacia proletaro determinis prokrastigon en la asçedanta vojo transforma de la proletaro k akcelante kontraste la antaŭenpaŝon de la faŝismo, kiu vidis sin ekde la unuaj momentoj apogata rekte, efike k konstante de la faŝistaj potencoj k malrekte de la inhibicio de la demokratio.

La rezolucioj rezultantaj el la debato super la informo de C. N. T. (la tria punkto de la tagordo) k la pozicio de A. I. T. antaŭ la revolucia milito de Hispanio (la kvina punkto de la tagordo) estis gravegaj. La Kongreso aprobis la sekvatan linion de C.N.T. k skizis laborplanon por A.I.T., kondukanta akceli la mobilizon de la entuta proletaro k tre speciale por meti finon al la farso de la "Ne-interveno", premante por tio al la registaroj de la respektivaj demokrataj landoj.

La alia fundamenta punkto en la tagordo de la Kongreso de A.I.T. estis la sesa, en kiu, laŭ propono de C.N.T. oni ekzamenis la neceson formi Antifaŝistan Proletan Fronton por bati la internacian faŝismon.

Ŝprucis ampleksaj diskutoj dum kiuj demonstriĝis, ke la eraro de la Laboristaj Internacioj, ne mobilizante la proletajn amasojn, kiujn ili kontrolas por agadi kontraŭ la faŝismo k malebligi la "Ne-intervenon" determinis, ke en la laborista k antifaŝista Hispanio oni ankoraŭ ne batis la faŝismon, ĝuste pro manko de batalilој k eksterlanda solidaro.

Ĉe la fino de la ampleksa debato oni akceptis la prialiancan tezon de C.N.T., pro kio A.I.T. direktos sin tiel baldaŭ kiel fondiĝos la nova sekretariaro, al la Laboristaj Internacioj por proponi al ili la realigon de Laborista Antifaŝista Alianco, k ke oni skizu senprokraste laborplanon cele, unuavice, bojkoti efike ĉiujn produktojn el la faŝistaj landoj k akceli la venkon de la hispana antifaŝismo.

Ni povas diri, ke unuafoje ekde deknaŭa de julio 1936a la internacia proletaro, kunvenigita pere de unu el siaj organizoj, pristudis varme k atribuis la gravecon, kiun havas la socia milito, kiu aktuale okazas en Hispanio, adoptante rezoluciojn praktike realigeblajn, kiuj ebligos efektivan solidaron al nia luktado kontraŭ la faŝismo.

La Kongreso decidis renovigi la sekretariaron de A.I.T., determinante, ke la ĝeneralan sekretariaron de la sama prenu sur sin C.N.T.

Oni devas atendi, ke la decidoj de ĉi tiu eksterordinara Kongreso de A.I.T. devus havi baldaŭan resonon en la internacia proletaro, akcelante antaŭ ĉio la unuecan agadan de la sama por bati la faŝismon, ĝian multjaran malamikon ĉie k de ĉie.

Nur necesas, ke la laboristoj internaciaj, priatentante la cirkonstancojn, alprenu, pristudu k akceptu definitive la proponojn pri agad-unueco, kiujn baldaŭ faros A.I.T.

La tutmonda proletaro, unuigita k agante laŭ ofensiva plano kontraŭ la faŝismo decidos kun la heroismo de la popolo, kiu laboras k luktas en Hispanio, ke la venko estu nepridiskutebla.

## RELIGIA BLEKADO TRA LA TUTA MONDO

**La "Living Church" antaŭ nelonge publikigis statistikon, kiu montras kiel la ŝafaro nun blekas:**

**Tuta Kristanaro: 692.400.000 el kiuj.**

**Rom-katoliko: 331.500.000.**

**Protestantoj: 169.800.000.**

**Ortodoksaj katolikoj: 144.000.000.**

**Koptaj katolikoj: 10.000.000.**

**Anglikanoj: 37.100.000.**

**La nombro de la ne-kristanoj estas: 1.167.600.00 el kiuj.**

**Judoj: 16.140.000.**

**Mahometanoj: 209.150.000.**

**Budaistoj: 150.100.000.**

**Hindoj: 230.140.000.**

**Pro la lano la dioj certe aŭdas la blekadon!**

**Klas KARLSSON**

**La Proletaj Esperantistaj Organizoj en Barcelono ILES k PUIL publike deklaras, ke ili, samkiel la ceteraj proletaj organizoj, antaŭ pli ol 3 monatoj retiriĝis el la Kontraŭfaŝista Esperantista Komitato en Barcelono. Ĉe la Generalitato restas nur Esperanto-Sekcio, kiu tute ne rajtas reprezenti ian nepluekzistantan Komitaton.**

**La diskomponiĝo de la Komitato rezultis el ĝies heterogena konsisto, kun reprezentantoj de organizoj de ne rivelita kontraŭfaŝismeco. fakto kiu malebligis plensangan kunagadon kontraŭfaŝisman.**

**ILES k PUIL komunikas tion por evitigi perturbon k eventualan miskomprenon tiurilatan.**

# Internacia Angulo

KOREKTO:

Ĉar en la n.º 9-10 estis apartaj dankoj direktitaj al mi de la redaktantoj de "Inf. Bulteno" pro mia aktiveco, mi supozas, ke la dankantoj ne estis sufiĉe klare informitaj pri mia "aktiveco" k ankaŭ ne konas la verajn kaŭzojn aŭ karakteron de ĝi. Tial mi petas rajton ion informi, por forigi la nebulan imagon pri mia "aktiveco".

Mi ne rajtas akcepti privatajn dankojn pri laboroj, kiuj estas grandparte faritaj de aliaj k-doj k tute ne de mi. Mi same kiel ĉiuj aliaj estas nur ero en la kolektivo k ne pli aktivas ol la k-doj ĉirkaŭ mi. La dankoj tial devas esti direktataj, unue al ĉiu k-do en la Stokholma grupo (neniu esceptita), la grupo en Gotenburgo (nia plej malnova grupo en Svedio). La grupoj en Polio, en Bulgario, Holando, Francio, Argentinio, Belgio, Danio, Ĉinio k ĉielande. Same ankaŭ al ĉiuj unuopuloj el ĉiuj landoj, kiuj kun mi laboris en la lastaj du jaroj. Koncerne la agadojn en Svedio ili dependas de simpatio k kompreno en vastaj rondoj k tial la dankoj al mi tute maltrafis sian celon.

Sed kial danki? Ni ĉiuj nur plenumas et-eton de nia memklara devo. Ĉu ne, kamaradoj?

**Adrian PERSON**

* * *

Ne ripozas la ĝek-kdoj en la teror-landoj.

El la lando, kie la terorismo eble furiozas plej krude, nome Polio, niaj k-doj senlace propagandas por niaj liberecanaj ideoj sub cirkonstancoj ne imageblaj al alilanduloj. La obstino, kun kiu ili daŭrigas sian propagandon estas pli ol heroa, ĉar survoje inter la malliberejoj ili agadas. Mizero, korzika teruro, batoj kaj turmentoj signas ilian marŝadon liberecan, sed sen ŝanceli aŭ laciĝi ili daŭrigas la iradon sur la dorno-pasejon por plenumi sian mision en la konkero de pli feliĉa stato tuthomara.

Se iuj indas glorkronon por martireco, tiuj estas la unuaj pioniroj en la nomita lando. Dankoj k simpatiesprimoj ne povas ilin helpi. Ili indas pli. Ili indas ĉian realan helpon, kiun ni povas doni.

Malgraŭ senlaboreco, ega malriĉo k oftripetata restado en la ŝtataj kazematoj, ili tamen sukcesis nun kolekti pli ol 100 slotojn (ege malgranda sumo por malriĉuloj), k tiu sumo ili nun deponis por eldoni libron pri la liberecana agado (C.N.T.-F.A.I.) dum la hispana batalo. Jam venis al Stokholmo 40 slotoj k la alian monon ili sendos, kiam ni povas garantii al ili la realigon de la libro.

La Stokholma grupo, lastkunvene, faris decidon urĝe provi realigi la deziratan eldonon. Ni jam ekagadis por fari la unuajn paŝojn.

Nun ni turnas nin al ĉiu k-do, amiko, simpatiano k samideano por subteno en nia laboro. La fonduso jam estas fondita de la koncernaj k-doj mem per 40 slotoj. La stokholma grupo laŭ sia kapablo subtenos k ni esperas ke neniu komprenema homo volas malesti en tiu ĉi subtenado. Tial ni esperas multon de niaj amikoj k kuraĝe ni do ekiras al laboro.

Pripensu, ke tute mankas libereca literaturo en la koncerna lingvo k ke la nomitaj k-doj vere malsatas pri tia literaturo.

La planita libro-eldono okazos kiel plej eble baldaŭ k estos esperant-teksta. La stokholmo grupo jam intertraktas kun presejoj por havi ĝin presota bonstile k tutperfekta. Ni mobilizis jam ĉiujn kapablojn al eka laboro.

La libro servos speciale kiel armilo por rebati ŝvarmojn da mensogoj superŝutataj sur niaj heroegaj p. amikoj. Ili volas defendi en sia lando la hispanajn heroojn. Ili volas efektive labori en sia fronto. Do, vian devon vi mem scias, k-do!

K-doj! pritraktu la supran inter vi. En venonta n.º venos pli ekzakta plano pri la subtenmaniero.

Liberecana saluto!

**LA STOKHOLMA GRUPO**

# PROMENEJO

La ĝenerala sekretariino de IPE Glady Keable en "Sur Posteno" (n. 57a) parolante pri la unueco de la laboristaj esperantistoj, rimarkigas rilate al la hispanaj:

"La hispanaj laboristoj esperantistaj jam faras la unuajn paŝojn direkte al konstruo de nur unu enlanda laborista esperantista asocio. En Barcelono jam ekzistas "Antifaŝista Esperantista Komitato", en kiu laboras esperantistaj organizoj pri eblo kunigi la fortojn en unu landa organizo."

Vere Bosk cirkuligis leteron-proponon pri "konstruo de nur unu enlanda laborista esperantista asocio", sed ĝi senpostsigne forfalis. Konstruo de nur unu enlanda laborista esperantista asocio, kiel kuniĝo de la ekzistantaj laboristaj unioj k ligoj, konservante sian individuecan fizonomion k aŭtonomion, jes, sed kunfandiĝo de ĉiuj laboristaj esperantistaj asocioj —aspiro laŭideologie neakceptebla k sur la praktika kampo apenaŭ realigebla.

En Barcelono jam ekzistis antifaŝista esperantista komitato, en kiu kunlaboris esperantistaj organizoj el ĉiuj tendencoj. Nun, post la retiriĝo de la laboristaj esperantistaj organizoj, jam kunlaboras nur la neŭtraltendencaj.

* * *

J. G. babilas en "Franca Esperantisto" pri la Varsovia kongreso:

"Ni komencis ĉiutage manĝante acidajn laktporkaĵojn k legomojn senlimajn: milion, poligonon, beton, rizon. Kiaj gigantaj porcioj! Vespere omletojn ni mendis, por la plezuro vidi en niaj teleroj kvar grandajn omletojn laŭkruce aranĝitajn, falditajn kun pomkompoto. Mi sukcesis, unu tagon, manĝi tri el ili, sed pro timo de sufoko, mi devis proponi la kvaran al la mariĉuloj."

Kompatindaj malriĉuloj! Certe ili sufokiĝis pro unu omleto.

La aŭtoro konkludas:

"Sume, malgraŭ malgravaj alkroĉaĵoj, mi devas diri, ke ĉiuj estis kontentaj pri la kongreso, pri ĝia laboro, ĝiaj festoj."

Kiel ne! Se vi "komencis ĉiutage manĝante"...

* * *

La redaktoro de la ekaperanta gazero "Radiesteza Gazeto", s-ro Pierre Delaire (prononcu Delir) delire propagandas la verkon de Emile Christophe -"Estu Radioesteza Serĉisto" (eble pli ĝuste ŝercisto) k ekkrias:

"Kiu ne aŭdis pri Radiestezo, la arto percepti per la pendolo aŭ la vergeto, la radiadojn, eliĝantajn el la estnloj k estaĵoj?"

Kiu ne aŭdis pri la Radiesteza ŝercisto Pierre Delir, el kies kappendolo eliĝas klasikaj delirajoj?

La ŝercisto demandas:

"Ĉu ni ne povas opinii, ke la celoj de Esperanto k de Radiestezo estas iomete similaj? Jes, kompreneble."

Pro kio iomete similaj? La delirajoj de Pierre Delir en Esperanto estas eg-ege similaj.

**PARIO**

# Kion faris la sindikatoj de C. N. T.

Redaktoroj de "Fragua Social" vizitis Madridon k havis interparoladon kun kamaradoj el la Komitato de la Kamparana Federacio, al kiuj ili plantis kelkajn demandojn.

—Kiam organiziĝis la unua kamparana kolektivo?

—La unua kolektivo estis tiu kiun faris la Unika Sindikato de la Variaj Oficoj en la zono de Villaverde. Tie estis farmejo malbone prizorgata k aĉe administrata. Ĝia posedinto forpelis la laboristojn-plugistojn sen pagi al ili k estis preta lasi neplugata la legomejon.

Tiam la dek kamaradoj, kiuj tie laboris, venis al la Sindikatejo. Ni proponis al la farmisto kolektivigi la farmejon k ekspluati ĝin komune, k antaŭ ol unu semajno la afero marŝis mirinde, kun la natura konsterniĝo de la patronoj. Sen ies apogo, nur kun la forto de la kolektivigistoj, unuj el ili kronitaj per la plej grandaj triumfoj de la agrikulturista klaso de Madrido. Gajni strikon al la plugistoj. Ĉi ĉio havas sian eksplikon. K tial ke nia kolektivigita mastrumejo funkciis perfekte k produktis la sufiĉan por multaj familioj, ni deklaris strikon al la patrono, prizorgante provizumi ĉiujn strikontojn per la produktoj el nia kolektiva legomejo. Tiel ni pasigis sep semajnojn, k finfine ni venkis, ĉar ja la patronoj ne povis elporti la ruiniĝon de sia ekspluatado apogata sur la laborforto de la laboristoj, kiuj laboris en la farmejo. El tio elŝprucis tio kio hodiaŭ estas admiro por la kamparanaj kolektivoj en la zono de Villaverde.

—Kiam la posedintoj forkuris k forlasis la kamparon. —Ni sekvas konversacii kun la kamaradoj de la Komitato. Julián Cuadrado k Nicolás Caldeo estas delegatoj lokaj k nun pesas rizon k aliajn nutraĵojn, kiuj estos distribuitaj inter la kolektivigistoj. Temas pri produktoj interŝanĝataj kontraŭ legomoj. Ankaŭ helpas en la laboro Emilio del Hierro k Agustín García, kalkulisto k sekretario, kiun kune kun la kasisto, k-do Salomón, ni vidis antaŭ iom supreniri al la deponejo por malŝarĝi sakojn el la korto. La ritmo de la kolektivo ne perdiĝas eĉ unu momenton. Oni parolas k laboras. Dum ni parolas, Sanz de Ancos rememorigas sian longan restadon en la fronto de Aragón k fotografas. Ni plu ekinteresiĝas pri la konstrua funkcio de la kamparana kolektivo.

—Kiel aperis ĉi tiuj kolektivoj?

—Atentu, kamarado. En Madrido stariĝis tre angora kazo por multaj domaĝitaj de la milito. Al la urbo alkuris svarmo da homoj el la provinco, evakuitoj kiuj devis labori. Ni okupis nin pri la kamparanoj. La legomejoj, kiuj troviĝas ĉirkaŭ la Madrida kvartalo, k pli proksime ankoraŭ al la lokoj okupataj por la fronto, estis forlasita de la mastrintoj. Kiel pli bone okupigi ilin ol funkciigi tion kio estis tiel bezona por la milito, la produktado de la nutraĵo? Pensite k farite. De Septembro ni okupis nin pri la ekspluatado de kelkaj farmejoj, kiujn ties mastrintoj estis lasintaj sen kulturi, la plej parto el ili apartenintaj al la forkurinta nobelaro, al nobelaj titoloj ktp. Dum la kolektivigado aperis nur du el la posedintoj, akcentante pri siaj rajtoj, k ni akceptis ilin en la kolektivo, k hodiaŭ ili laboras kun entuziasmo kiel ĉiuj kolektivigistoj.

—Atentu, al ni diris niaj kamaradoj, ĉi tie oni kultimas labori pogrupe. Grupo kulturas terenon da grundo. Tiu grupo nombras kiel delegato tiun, kiun ĝi juĝas teknite la plej kapabla. Tiu delegato interrilatigas sin ĉiutage kun sia grupo, pristudas la laborbezonojn, la obstaklojn, tion kion la grundo postulas urĝege, k la delegatoj siaflanke devas ĉiutage kunveni k trovi facilojn por solvi kune la bezonojn kiuj urĝas.

Tial ke la tuta mondo havas laboron, kun la delegatoj, kiuj observas la teron k realigas la decidojn, estas kontentigataj la postuloj de la kolektivo rilate al la tekniko. La administrado kuras je ŝarĝo de kvar kamaradoj, kiuj siaflanke havas respondecon pri la respektivaj sekcioj.

En rekta kontakto la 260 kolektivigistoj, kiuj konsistigas nian kampharanan organizon, la harmonio reflektiĝas en la utilo, kiun oni eligas el la grundo.

Post kiam oni donis al ni detalojn, ni ĉirkaŭiris tra inter la plantejoj unuj k aliajn legomejojn. Tio, sen atingi hiperboli, estas vera florejo. Ĝis nekredebleco estas prilaborita la legomejo, k la frukto montriĝas malŝparema al la kolektivigistaj laboristoj. En tempo de paco, tio kio hodiaŭ estas farata en la mema koro de Madrido, ĉirkaŭante ties antaŭurbajn farmejojn, estos siatempe la plej bela zono, kiu estas montrebla de iu urbo. La akvo, kondukita de la memaj kamparanoj kun faroj realigitaj surbaze de la utiloj, kiujn donas la grundo, faras el Madrido nova, kiu forĝiĝas en ties ĉirkaŭaĵoj, panoramon da pejzaĝoj el la plej belaj legomejoj el Valencio.

Tiel kiel Ganivet diris, ke el la urboj speguliĝas "la unua, kion el ili ni observas, kiam la fervojo alproksimiĝas tra siaj naturaj irejoj", tiu de Madrido certe estos la admiro por tiuj kiuj vizitis ĝin antaŭe la okazo de la glora revolucio de julio.

Pli ol du kilometroj da solida akvedukto iĝas, ke la akvo de la rivereto, malprofitata ĉiam, akvumu pli ol 64.000 areojn da grundo, kiu antaŭe estis malfekundega. Mankas nek la transformilo, nek la akveduktoj, nek la brilega kanalo por la akvumado.

—K ĉi ĉio aliigi en akvumeblan tereron tiun vastan surfacon, estis ideo de la kolektivigistoj?

—Sendube. K kun la koopero de la kamaradoj de la Sindikato de la Konstruistoj ni realigis dum malpli ol tri monatoj. Ĉi tie estis elspezitaj pli ol cent mil pesetoj por tiu priakvumada laboro, k por la plifekundigo de la grundo ni uzis monkvaton ne pli malgranda.

—Kioman tagsalajron ricevis la laboristoj se vi tiom elspezis por tiuj faroj?

—Pli ol la duoblo ol kiun ili gajnis, kiam dependis de la patrono. Ĉi tie ni ĉiuj komencis enspezi ses pesetojn tage. Post du monatoj ni povis enspezi 8'50 p-tojn. k nun ni gajnas 12 ptojn. plus 1'50 en legomaĵoj por la konsumo de familio. Kun tio la kamaradoj povas interŝanĝi. Krome kiam ni havis superfluajn produktojn k atingis interŝanĝi en la kolektivo, ni distribuis artiklojn: rizo, terpomoj, sapo, oleo, ktp. Tio ĉiam dividiĝas en egalajn partojn k kiel aldono al la tagsalajro.

Tamen, tial ke la grundo estas kulturata k de ĝi ni

C. N. T. F. A. I.

# Al la celparencaj organizoj k la kamaradoj el la diversaj landoj

La Sekretariaro pri Eksterlandaj Rilatoj de C. N. T. k F. A. I. vidis sin devigata direkti al la celparencaj organizoj el la tuta mondo k al la libera opinio ĝenerale por averti ilin kontraŭ certaj agoj, kiujn ĝi konsideras fundamente nemoralaj k atentindaj kontraŭ la prestiĝo de niaj organizoj.

Ni celas la diversajn komitatojn, kiuj plurloke k kun malsamaj nomoj kreiĝis, alvokante la apogon al la "viktimoj de la hispania kontraŭrevolucio" k petante fondusojn tiacelajn. De certa tempo konstituiĝis en Parizo organizajo kun tia nomo, kiu sin direktis k plu direktas sin al la k-doj el ĉiuj landoj, postulante preme monapogon. Siatempe la Nacia Komitato de C. N. T. esprimis sian forpuŝon al dirita Komitato konstituita sen antaŭa konsulto kun C. N. T. k F. A. I. rekte tuŝataj tiukaze. Ni konsideras neprudente, ke temante pri problemo rekte kunligita al la hispania revolucio, ĝi apartiĝas de niaj organizoj, impresigante, ke ili estas reduktitaj al senpoveco ĝis la punkto peti la materialan solidaron por la "viktimoj".

Malgraŭ nia kategoria deklaro, tiu komitato k aliaj similaj plufunkcias, farante frakasigan propagandon, kiu malutiligas rekte al la koncepto, kiun la laboristoj el la mondo havas pri C. N. T. k F. A. I. Pro tio ni direktas nin ankoraŭfoje al la aluditaj internaciaj organismoj por deklari la sekvantan:

1. Ke ni ne rekonas personecon al la t. n. "Komitato pri Apogo k Helpo al la Viktimoj de la Hispania kontraŭrevolucio", kun sidejo en Parizo k al aliaj similaj.

2. Ke C. N. T. k F. A. I. prizorgas per propraj rimedoj la kamaradojn, kiuj suferas persekuton en Hispanio.

Ni rekomendas, ke oni ne priatentu ĉiun peton pri materiala solidaro por la liberecana movado en Hispanio, kiu ne estas subskribita de nia organizo.

Ni konsideras nedignaj al ĉia apogo tiujn kiuj sen ia motivo forlasis sian batalpostenon en Hispanio por translokiĝi al eksterlando.

Ni esperas, ke la kamaradoj el ĉiuj landoj ne lasos sin surprizitaj de propagando insida k frakasiga, kiu senmoraligas, k ke ili kontribuos per sia bonvolo al la ĉesigo de la malinda spekulacio, kiu estas efektivigata rilate al la luktado de la hispania proletaro.

LA SEKRETARIARO PRI LA EKSTERLANDAJ RILANTOJ DE C. N. T. k F. A. I.,
LA DUONINSULA KOMITATO DE F. A. I.,
LA NACIA KOMITATO DE C. N. T.

---

eltiras maksimuman produkton, ankoraŭ superfluas pesetoj por doni al organizoj, se ili bezonas k por propraj militbezonoj sen neglekti la propagandon de niaj kolektivaj ideoj.

Ni kredas, ke la plej bela propagando de nia afero estas, ke la kamaradoj de aliaj sindikatoj vizitu niajn legomejojn.

En la kolektivo ni havas unu ĉarpentiston k unu mekanikiston, kiuj preferis aparteni al la kolektivo k enspezi tagsalajron surbaze de laboro en sia industrio. La unika propagando al la kolektivismo estas vidi en marŝo la proprajn kolektivojn. Ĉio kio estas direbla pere de la tribuno aŭ pere de la gazetaro, neniam reflektas la solidaron k la fervoron de tiuj, kiuj vivas por fari el la laboro iom pli ol unu suferiga angoro.

Por fari la fojnorikolton ni ne bezonis aliulan apogon. Ĉi tie oni kolektis ĉion dum malpli ol 41 tagoj. En 7 tagoj la kolekton k la draŝon de tio kio estis produktinta unu el niaj grupoj.

Ĉi tie la tuta mondo donas maksimuman klopodon. Ĉiu ja scias, ke laboras por si mem k por la plibonstatigo de siaj fratoj k tio sufiĉas.

Mi rememoras, ke prezentiĝis al unu el niaj legomejoj grupo da "voluntuloj". Ni diris al ili, ke ni havas falĉilojn k semilojn k ke ili povas labori tion kio al ili plaĉas, k... ni ankoraŭ estas atendantaj, ke ili revenos. Ili adiaŭis per "ĝis morgaŭ" k tiu "ĝis morgaŭ" neniam venas.

Alia el la fundamentaj aspektoj de bona kolektivo estas la administrado de ĝies produktoj.

La delegatoj estas rajtigitaj por disdoni biletojn k vendi je fiksa prezo por la kolektivo en la mema legomejo.

Krome ni provizumadas kolektivajn manĝejojn en la urbo kiel same ni provizumadas ĉiutage la Reguligan Komitaton pri la Hoteloj.

Ni ne povis porti la pruduktojn al la merkato pro la simpla kaŭzo, ke ni konsideras tre alta la procenton, kiun oni detenas pri la elspezoj de la vendado. La kamaradoj de la merkato ne priatentas, ke la perantoj jam senintermite malaperis, k estis kiuj plikarigis la produktojn. Kelkfoje ni provis interrilatigi nin kun ili, sed oni ne akceptis nian proponon vendi sen deteno. Tion ni povas diri orgojle, ke kun nia sistemo pri rekta vendado ni atingis malpliAltigi la prezon de la tomatoj lasttempe de 1'50 ptoj. kilogramo al 1'00 p.

—Sur la vojo al Valencia, al ni diras kamarado, ni krozis antaŭ jaro kun miloj da aŭtomobiloj, kiuj kapturniĝe estis forkurantaj el Madrido. Tiuj kiuj forkuris por saviĝi el la danĝero, ne priatentis la direkton, al kiu ni turnis nin. Ni ja havis fidon en la venko, koncepto pri nia devo k antaŭ la propra vivo ni prikonsideris la aferon de nia kolektivo k produktado. Ili, eble, nerekonas nian faron, ĉar ili ne havis tempon por halti k rigardi al nia vojo, sed vi povas bone konstati, kia diferenco estas inter la unu k la alia.

# La Batalionoj C. N. T. k F. A. I. Konkeris Teruel-on



Ĉe la konkero de Teruel la Batalionoj de C. N. T. k F. A. I. ludis decidigan rolon. La Divizio 25, konsistigata el la Brigadoj 116, 117 k 118, plenumante ordonojn de la Alta Komando, eliris al la fronto de Teruel cele situiĝi en la lokoj, kiuj estis desegnitaj al ĝi. La Divizio 25 estas estrata de la maljuna batalanto de C. N. T. k-do Vivancos (Vivankos), kiu ekde la komenciĝo de la milito estas donanta militservon tre grava. La Brigado 116 kies ĉefo estas Boada k Politika Komisaro estas Francisko Meroño (Meronjo), ankaŭ maljuna militanto de C. N. T., translokiĝis al la vilaĝo Korbalan. La Brigado 117, kiu ankaŭ estas estrata de k-do Bretos, situiĝis en Escriche (Eskriĉe), la Brigado 118, kies ĉefo estas Kastan k Politika Komisaro Karod, situiĝis en Cedrilla (Cedrilja). La Generala Stabo de la Divizio instaliĝis la 11-an de Decembro matene en la vilaĝo Korbalan. Frumatene la 15an la Brigado 116 k 117 pretiĝis al atakpozicio, atendante la ordonojn de la Komando de la Divizio, kiu siaflanke situiĝis en Muletón.

Plenumante ordonojn de la Alta Komando la Brigado 116 realigis tiun tagon brilegan laboron, okupante ĉiujn poziciojn, kiuj estis signitaj al ĝi. La lokoj konkeritaj la 15an servis kiel apogpunkto por la totala konkero de Teruel. La batalo estis tre dura, ĉar dum la tuta tago oni ne utiligis alian batalilon ol manbombojn. La Brigado 116 devis eltiri la faŝistojn el la tranĉeoj k la fortikajoj per la mema bajoneto. La saman tagon la Brigadoj de la Divizio 25a, en kunlaborado kun aliaj fortoj, kiuj troviĝis flanke, konkeris la vilaĝon Konkud, izoligante totale la urbon Teruel k cirkaŭante ĝin. La 16an turmenta forto da aero k neĝo malebligis daŭrigi la operaciojn iniciatitajn tiel brilege. Niaj fortoj elportis kun vera stoic'smo la rigorojn de la vetero en siaj novaj pozicioj. La Brigado 116 prenis sufiĉajn militkaptitojn k enloĝigis konsiderindan numeron da forkurintoj dum la unuaj tagoj de la atako.

La 17an la Brigado 117a, kiu kiel ni jam diris, estas konsistigata el homoj de C. N. T., ĵetis sin sur la Tombaron, kun la kunlaborado de 20 tankoj, kiuj anticipe estis senditaj tiacele. Kvankam ke la tankoj ne funkciis kun precizo k efiko bezonaj, la atako al la Tombaro efektiviĝis kun vera kuraĝo k oni procedis evakui kelkajn domojn el la periferioj de Teruel, okupante la poziciojn signitajn de la Alta Komando.

La 18an la Brigado 117 havis atakon tre kruelan kontraŭ la poziciojn, kiuj defendis la Tombaron, atingante okupi kelkajn el la samaj. Evidentiĝis, ke tiuj pozicioj estis veraj fortikajoj konstruitaj el armcemento k ŝtonoj.

La saman tagon la Brigado 116, en kontakto kun du batalionoj de alia armeoparto, kiu ĉirkaŭis Teruel-on aliflanke k kiuj disiĝis nur 1.000 metrojn unuj de la aliaj, daŭrigis la batalon.

La Brigado 118, kiu ĝis 18a estis en rezervo, translokiĝis al la 117a por daŭrigi la batalon k operaciojn super Teruel flanke de la Tombaro.

La 19an la aviacio realigis plurajn superflugojn k la Brigado 118 kelkfoje provis por okupi la poziciojn, kiuj protektis la eniron al Teruel, sen rezulto. En vido, ke la tankoj ne donis kion devis doni, la oficiraro elmontris heroan geston, kiu estas vere nepriskribebla: Kun malkovrita brusto, k sen atendi, ke la tankoj ekfunkcius oni ekatakis la malamikajn poziciojn, malŝparante heroecon k aŭdacon. La rezulto de tiu atako estis brilega, kvankam ke je la kosto de tre konsiderinda numero da perdoj.

La 20an niaj baterioj komencis fortan kanonadon, kiu atingis alpreni admirindajn proporciojn. La Baterioj estrataj de la Komandanto Eskalon, pafadis kun nesuperebla certeco sur la fortifikaĵojn de la malamiko, kiu intencis antaŭeniri, rompante la sieĝon formatan de la fortoj de la 11a Divizio. Estis momentoj, en kiuj oni kredis, ke la faŝistoj atingus rompi niajn vicojn k unuiĝi kun la faŝistoj sieĝitaj en Teruel. La heroo de tiu batalo estis la komandanto Eskalona, kiu, estrante tri batalionojn, en tri horoj dispafis 1.500 dispafojn kun mirinda certeco. Laŭ la prikalkuloj de la militistoj ĉeestintaj, tiuj dispafoj kaŭzis al la malamiko ĉirkaŭ 3.000 perdojn.

Kiel detalo, kiu demonstras la nesuperebIan ekpuŝon de niaj batalantoj, ni elmontras la sekvantan fakton: Kelkaj grupoj de la Brigado 116 penetris en Teruel-on dum la nokto 19an k 20an regresante sen incidento k alportante valoregajn informojn por difinitiva rezulto de la bataloperacioj.

Tiun saman nokton pasis al niaj vicoj ŝoforo, kiu servis kiel ligilo al la faŝistoj k kiu rezultis esti frato de unu ĉefo de 25a Divizio. Tiel baldaŭ kiel li revidiĝis kun sia frato, li sciigis al li gravajn informojn super la situacio de la faŝistaj fortoj. Evidentiĝis, ke la urbo Teruel estas defendata de dek mil homoj proksimume. La sekvintan tagon okazis la plej mirigaj bataloj. Ĉi tiuj okazis ĉe la eniro de la vojo de Teruel al Cortes (Kortes). En ĉi tiuj agadoj gloriĝis la Brigadoj 117 k 118, kiuj kaŭzis al la malamiko grandan kvanton da perdoj. La plej grava parto de la konkero de Teruel estis je ŝarĝo de la Miksa Brigado 116. El ĉiuj agantaj fortoj estis ĝi, kiu troviĝis pli proksime al Teruel, ĉar la antaŭan nokton ĉi tiu Brigado estis preninta la malnovan Tombaron, t. e. la eniro al la stratoj de la urbo. Posttagmeze 21an, dum la Brigado 116 luktadis furioze en la stratoj de Teruel, oni komunikis, ke la urbo transdonis sin al la 20a armeo. Niaparte en la bataloperacioj partoprenis la armeoj 18a, 20a k 22a.

Dek tagoj da teruraj bataloj, degeligante la froston k la neĝon, pruvas la militmoralon de niaj batalantoj, kiu agadis perfekte ekipitaj k bone provizumataj.

Distingiĝis eksterordinare nia kamarado komandanto Vivankos, kiu antaŭ da tagoj ŝanĝis la batalbazon, enirante al Teruel tra la ĉirkaŭjoj de la rivero Azambra anstataŭ tra la vojo de Teruel al Kortes; la komandanto Navarro ĉefo de bataloperacioj; Silvestre, helpanto de la ĉefo de la Divizio k Gines, oficiro de la Komando pri Informoj. Ĉiuj ili apartenas al la Divizio 25.

Ni certigas sen timo esti dementitaj, ke la ĉefoj, ofi-

# KRONIKO

*La redakcio de "Inf. Bul." decidis eldoni serion da libroj super la revolucio k la milito. La unua numero aperos ne postlonge k enhavos ĉirkaŭ 100 paĝojn. Ĉi libron rajtos ricevi senpage ĉiu nia leganto, kiu ĝis ĝies apero mondonaŭcis al "I. B.". La ceteraj legantoj akiros ĝin kontraŭ pago. Krome, la neabundo de papero devigos nin eldoni limigitan kvanton. Tial ni atentigas al la kamaradoj kiel eble plej baldaŭ fari mendon. Pro la ofta vario en la prezo de la papero la prezo de la libro estos fiksota iom pli poste.*

* * *

La Jurnalo "*Castilla Libre*" liberecana organo aperanta en Madrido skribas:

"Kun la lojaleco kun kiu ni ĉiam kondutas al niaj fratoj, kiuj luktas kontraŭ faŝismo, ni devas averti, ke en tiuj ĉi momentoj C.N.T. estas preta, kiel ĉiam, atingi la unuecon por gajni la militon. Ni ne volas la unuecon por servi kiel instrumento de la politiko de partio. Ni volas la unuecon, ni volas ĝin fervore por unika celo: gajni la militon."

* * *

La 18an de Decembro okazis en Parizo granda mitingo organizita de SIA favore al la laborista Hispanio. La oratoroj Paul Rivert, Jean Nacher, Huart, Doumoin, Sebastian Faure, Marceau Pivert k Mariano Vázquez de C.N.T. petis la malfermon de la landlimo k la sendon de nutrajoj al respublikana Hispanio. SIA deklaris, ke helpas al ĉiutendencaj antifaŝistoj ekstere de partia konsidero. Rezolicio voĉdonita ĉe la finigo de la mitingo, petis la fratecan intervenon de la franciaj laboristoj favore al la laborista Hispanio, la sindikatan unuecon k la liberigon de la antifaŝistoj retenitaj en Madrido, Valencio k Barcelono.

* * *

En aŭtomobila akcidento, en la plenumo de sia devo kiel ĝenerala sekretario de la Regiona Komitato de JJ. LL. de Katalunio, trovis sian morton la aktiva batalanto anarkista Petro Konehero.

Lia pura aktiveco en C.N.T. k F.A.I., lia laboro en JJ. LL. faris lin inda al la komuna estimo, kiun li ĝuis.

C.N.T., F.A.I. k JJ. LL. perdis unu el siaj plej valoraj membroj, Petro Conejero. Kamarado nobla k simpleca, inteligenta k abnegacia, falis por ĉiam, sed lia aktiveco, klara k difinita, malkaŝa k aroganta, vibras en ni, kiuj konis lin k vivis kune kun li dum la agado de nia movado junula.

Lia pruvita konduto estis por ĉiuj stumulo al admiro k simpatio, samkiel lia serioza k respondeca procedo, kiu, kiel vera batalanto, sciis imponiĝi antaŭ la devo kun la ideoj k kun la Organizo.

Kamarado Konehero pereis, kiam je la servo de la Organizo devis iri al Valencio al Vanacia plenkunveno de JJ. LL. por interpreti la senton de la kataluna movado, por transdoni la penson k la maltrankvilojn de la anarkistaj junuloj.

Lia kapableco tiel en ideologia aspekto kiel intelekta estis produkto de aŭtodidakta volo, de neprofanebla k aŭdaca forto. Ĉiujn siajn energiojn li dediĉis al la ideoj, al la Organizo, al la liberecana movado. ĉio por la triumfo de la revolucio por la alveno de la humana k transformita mondo.

* * *

Aktuale en Barcelono ekspozicias siajn verkajojn la meksika pentristo Gustavo Cochet. Motive de tio *Solidaridad Obrera* rimarkigas:

"Kun freŝeco k impulso de la arto de Gustavo Cochet, kiu aktuale ekspozicias siajn verkajojn en la salonoj de "Pinacoteca", surprizas la multobleco de la koncepto k aktiveco de la granda liberecana pentristo, naskita en la nemezureblaj ebenajoj de la Amerikaj pampoj k kiu briligis sian talenton en pluraj landoj, inter kiuj la nia.

En Hispanio li troviĝas nun en tiuj momentoj de luktado tragedia k heroa. Gustavo Cochet ekvolis travivi ĉi tiujn horojn de luktado k portas kiel signalon la krion fortan k. aŭdacan, ĉiam juna k revolucia.

Pentristo, akvafortisto, litografo, akvarelisto, kulturanto de ĉi tiuj ĉiuj aktivecoj plastikaj de la spirita emocio, Cochet scipovis interpreti intense sian penson k komuniki ĝin al la spektaklanto kun eksterordinara forto. Estas admirinda en ĉi tiu ampleksa floraro ne nur la arto, kiu ĝin inspiras, animas k disvolvas, sed la socia forto, kiu eliĝas el la vivpotenco de ĉi tiu granda interpretisto de scenoj, resumo de revolucia antalogio, kiu spiras profunde humanecon k kiu havas sian radikon firmecan en la hispania tragedio."

* * *

En Barcelono estas kondamnita je 6 monata enkareerigo juna laboristino tial ke fiksis sur muro paskvilon.

* * *

En Valencio komencas aperi semajna ĵurnalo *"Vida"*, organo de la Regiona Kamparana Federacio. La jurnalo pritraktas ĉiujn problemojn agrikulturajn. Al ĝi kunlaborados plej bonkvalitaj el plumigistoj. Hispanlingvanoj, petu "Vida"-n. Adreso: VIDA, Federación Regional de Campesinos de Levante (Sección Propaganda y Prensa), Avenida Nicolás Salmerón, 2, Valencia.

* * *

Laŭ lasta statistiko la nombro de la aliĝintoj al C.N.T. superas pli ol 2.500.000. Aparte granda kreskado estas registrebla en la Madrida regiono, kie post la revolucio la membroj pliiĝis konsiderinde. La anaro de C.N.T. en la Madrida Regiono ascendas ĝis 350.000.

* * *

K-do D. A. de Santillán verkis studon ekonomian. Lia nova libro titolas "La Revolucio k la Milito en Hispanio". K-do Santillán, kiel sperta ekonomisto, kompetente pritraktas la elŝprucintajn problemojn rilate al la revolucio k la milito: Fondiĝo, transformiĝo k militistigo de la milicioj, la Ekonomia Konsilantaro, la interveno de la internacia diplomataro, la Majaj eventoj, la helpo de Meksikio k Rusio, la plano de Eden, la antifaŝistaj enkarcerigitoj, kontraŭrevolucio k. a.

"La Revolucio k la Milito en Hispanio" de Santillán konstituas eg-egan intereson k krome havas kapitalan signifon historian kiel dokumentaro.

La libro estas presita en limigita kvanto k jam elĉerpiĝas.

* * *

La Sekcio de la Belartoj ĉe la Unika Sindikato pri la Instruado k la Liberaj Profesioj de C.N.T.-A.I.T. organizas de 30a de decembro 1937 ĝis 16a de januaro 1938 arteksopozicion. Ekspozicios pluraj pentristoj k skulptistoj.

---

ciroj k soldatoj de la Divizio 25a estis kiuj pleje kontribuis al la venko, kiuj ekde la unua tago atakis Teruel-on norde k nordokcidente, atingante ĝies kapitulacion. La surfaco de la tereno konkerita ekvivalentas 450 ĝis 500 kvadratajn kilometrojn.

Ni havis inter mortintoj k vunditoj, 2.000 perdojn. Kalkuliĝas ke la malamiko perdis inter mortintoj, vunditoj k militkaptitoj 10.000 homojn.

Tiu ĉiuj informoj estis komunikitaj al ni de la Interliga Komitato, kiun C. N. T. havas ĉe la okcidenta fronto.

La tasko de tiu Interliga Komitato estas kontroli ĉiujn fortojn en ĉi tiu fronto.

Ĉi informo estis farita la 11an de Decembro je la oka k duono en Teruel mem.

La ĉefoj, kiuj pleje elstariĝis dum la lastaj batal-operacioj, kiel ni jam diris estis: la komandanto Garcia Vivancos, Komisaro de la Divizio Antono Ejarque (Eharque), Komisaro de la Brigado 116a Meroño, tiu de 117a Barrios k Bretos, tiu de 118 Castán k Carod, ĉiuj ili maljunaj batalantoj de C. N. T. k F. A. I.

NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAUVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:

| K-dino A. BOIS | K-do Adr. PERSSON | K-do T. C. KLIJN |
|---|---|---|
| á MECÉ par VITRÉ (ILLE-et-VILAINE) FRANCIO | STADSHAGEN 13 - A STOKHOLMO, SVEDIO | DAPPERSTR 123 - huis AMSTERDAMO, NEDERLANDO |
| Francoj, ne forgesu vialandan kotizejon! | Svedoj, kotizu al privialanda peranto | Nederlandanoj pagu lauvolan abonprezon al nia amsterdama peranto |

La kotizontoj el la ceteraj landoj povas sendi sian kotizon k monhelpon al nia k-dino A. BOIS k k-do Adr. PERSSON kiuj estas niaj internaciaj geperantoj.

Anstataŭ sendi al ni responkuponojn, kotizu do rekte al niaj geperantoj.

La hispanaj abonpagontoj estas petataj sendi la monon rekte al ni per posta giro. Adreso por ili: «INFORMA BULTENO», Esperanto-fako, av. Durruti 30, Barcelono.

## Deponejo "INFORMA BULTENO"

| | |
|---|---|
| Salvador Ubach, Barcelono | 5'— p-toj. |
| Antonio Torm, Barcelono | 4'— p-toj. |
| Matías Pérez, Albacete | 20'— p-toj. |
| Julián k Rosa Humeneski, Barcelono | 25'— p-toj. |
| D. de Rapper, Sneek | 0'75 guld. |
| Nellie Kooijman, Roterdamo | 1'— guld. |
| SAT-ano 18.817 | 1'— guld. |
| J. Bout, Roterdamo | 6'— guld. |
| J. Bout, Roterdamo | 3'10 guld. |
| H. Jenken, Amsterdamo | 0'35 guld. |
| J. Koolmeier, Amsterdamo | 0'35 guld. |
| H. Siesen, Amsterdamo | 0'50 guld. |
| De Vries, Amsterdamo | 0'62 guld. |
| I. C. Klijn | 0'80 guld. |
| Gelin, Stokholmo | 0'75 sv.kr. |
| Nore Jonsson, Orebro | 2'5 sv.kr. |
| Levis Moberg, Gotteborgo | 3'— sv.kr. |
| El Polio | 1'— dol. |
| El Japanio | 1'— jen. |
| La Sindikato de Idekerbergets | 2'— sv.kr. |
| La Sindikato de Smedjebacken | 4'— sv.kr. |
| La Sindikato de Boliden | 5'— sv.kr. |
| La Sindikato de Rute | 5'— sv.kr. |
| La Sindikato de Pershyttan | 2'— sv.kr. |
| La Sindikato de Nya Varvets | 5'— sv.kr. |
| La Sindikato de Avesta | 7'81 sv.kr. |
| La Sindikato de Finspong | 3'85 sv.kr. |
| La Sindikato de Trollhâttan | 10'50 sv.kr. |
| La Sindikato de Oby | 7'50 sv.kr. |
| La Sindikato de Lilla Edet | 17'— sv.kr. |
| La Sindikato de Stromstad | 2'— sv.kr. |
| La Sindikato de Sodertelje | 5'— sv.kr. |
| La Sindikato de Karlskoga | 35'— sv.kr. |
| La Sindikato de Umeo | 10'— sv.kr. |
| La Sindikato de Vesters | 9'— sv.kr. |
| La Sindikato de Vexjo | 5'— sv.kr. |
| La Sindikato de Falkoping | 2'— sv.kr. |
| La Anarkista-grupo, Stokholmo | 10'— sv.kr. |
| Gunnar Svensson, Stokholmo | 5'— sv.kr. |
| O. H. Andersson, Sôdertâlje | 5'— sv.kr. |

Al ĉiuj ni esprimas sinceran antifaŝistan dankon!

## INFORMEJO

Anoncojn pri korespondado ni publikigas senpage.

* * *

K-do Petro Timmer deziras korespondi kun diverslandaj k-doj pri nia movado. res. gar. Adreso: Tidorestr. 22, II, Amsterdam (O).

* * *

Juna k-do, 15-jara deziras korespondi kun gejunuloj el ĉiuj landoj de la sama aĝo. Adr.: Antonio Sanchez, Mayor, 27, Alicante, Hispanio.

* * *

Korespondeca Centro Internacia, Helmerstraat, 22, Amsterdamo, havigas ĉiuspecajn korespondadresojn al la ĉiulandaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Petu tuj detalojn!

* * *

Kamarado Gugon Jeljavski deziras korespondi kun k-d(in)oj pri diversaj temoj el la vivo k bataloj de laboristoj el diversaj landoj. Ankaŭ pri junulaj temoj. Res. gar. Adreso: Str. Strodja, 58, Sofio, Bulgario.

## LETERUJO

*Pierre Locas, Parizo.* Sekvas letero.

*Onni Ruuskanen, Turku.* Dankon pri la res. kup. Regule sendata.

*Rune Fredin,* Kopperberg. Afiŝoj ne estas sendeblaj pro kaŭzoj nefirigeblaj niaflanke.

*H. Berg, Hoorn.* Kun emocio ni legis vian interesan leteron. Ni notis ĉion. La leteron ni transdonis.

*Eric Barow, Parizo.* Korektita.

*Petro van der Plank,* Amsterdamo. Dankon! Utiligota.

*Schirkl Lajos, Albacete.* Ni regule sendos.

*T. Altworth, Bedwas.* Dankon! La artikolo de Atlee tradukita hispanen k presita en "Solidaridad Obrera".

*A. Sanches, Albacete.* Ni anoncas. Kiam ni estos ricevinta la monon ni kvitancos.

*Manuel d'Almeida Costa, Fraga.* Atentu pri la poŝto! K skribu...

## LASTHORE

La "demokrata" registaro de Negrín malpermesis la kongreson de la Liberecana Junularo, kiu estis anoncita por la tagoj de 25 Januaro ĝis 6 Februaro.

---

En Kartaĥena estas enkarcerigita nia k-do Miguel P. Cordón, direktoro de la loka ĵurnalo "Cartagena Nueva" pro publikige de unu artikolo. K-doj, protestu!